


# LA DEKSEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET  
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : *France*, 1 franc. — *Etranger*, 1 fr. 50 par an.  
Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

## Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa ».

Groupe Espérantiste du XVII<sup>e</sup> Arrondissement de Paris.

SIÈGE SOCIAL : 179, Boulevard Pereire, Paris.

Ĉiumerkrede, je la naŭa  
vespere, okazas amika kun-  
veno de nia grupo ĉe la

Tous les Mercredis, à 21  
heures, réunions amicales de  
notre groupe au

**Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris**

Téléphone : Wagram 30 - 46

1-a etaĝo. Speciala eniro.  
Urba fervojo : stacidomo  
Pereire.

1<sup>er</sup> étage. Entrée particulière.  
Métropolitain : station Pe-  
reire.

La kongresanoj ĉeestantaj  
en Paris antaŭ la kongresa  
malfermo estos kore ak-  
ceptataj.

Les congressistes qui se-  
ront à Paris avant l'ouverture  
du congrès, sont cordiale-  
ment invités.

Le secrétaire, ROBERT BOLLACK.

# Dixième Congrès Universel d'Esperanto

Paris — 2-10 Août 1914

Le Congrès aura lieu dans le « Gaumont-Palace », rue Caulaincourt - place Clichy.

La carte du Congrès coûte 15 francs et 25 francs pour les personnes qui s'inscriront après le 1<sup>er</sup> Juin 1914. La femme et les enfants d'un congressiste paieront par personne 10 francs ou 20 francs après le 1<sup>er</sup> Juin 1914. Ces derniers congressistes n'auront pas droit aux documents du Congrès.

Les adhésions sont reçues tous les Mercredis soir aux réunions de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa », Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

Dek-Sepanoj aliĝu! Per via tuja aliĝo vi montros vian firman deziron sukcesigi tiun internacian festaron!

Vivu la Deka!!!

\* \* \*

La 26-an de Majo 1914 estis 2525 gekongresanoj.

**AVIS.** — *Le prochain numéro de la « Dek-Sepa » paraîtra à la fin du mois de Juillet et sera exclusivement consacré au X<sup>e</sup> Congrès et à l'histoire de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa » de Paris.*

---

## OUVRAGES de M. Henri de Coppet.

*En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».*

- L'Esperanto appris sans maître en 15 leçons . . . . . fr. 1,50  
Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de  
2800 phrases de la vie usuelle . . . . . fr. 1,80  
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof,  
édition pour tenor ou soprano . . . . . fr. 1,50

## **L'Esperanto à Paris et en France**

---

La prochaine réunion des Groupes indépendants aura lieu le Mercredi 10 Juin 1914, au siège des réunions de la Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa », Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris, à 21 heures.



Le congrès de la S. F. P. E. aura lieu cette année à Paris, le 1<sup>er</sup> Août, avant l'ouverture du X<sup>e</sup> Congrès international.



L'Amicale des Anciens Elèves de l'Ecole de la rue Berthelot à Villeurbanne (Rhône) a organisé un cours d'Esperanto.



Le Conseil municipal de Chalon-sur-Saône a voté une subvention au groupe Espérantiste de cette ville.

---

## **L'Esperanto à l'étranger**

---

Le congrès national espérantiste belge aura lieu le 31 Mai, et le 1<sup>er</sup> juin à Malines.



Le congrès national espérantiste italien aura lieu à Bologne, du 24 au 27 octobre prochain.



Un cours d'Esperanto pour les membres de la Croix-Rouge s'est ouvert à Barcelone.



A Helsingfors un cours fait aux aveugles a réuni 24 élèves.



A Nürenberg l'Ecole libre de Commerce a inscrit l'Esperanto à son programme d'études.



La nouvelle adresse de la Brita Esperanto-Asocio (B.E.A) est 17, Hart Street, London W.C.



## Epizodo dum la japana-rusa milito

Ni supreniris la ferdekon. La nokto estis densa, blov-ego forta kaj senĉesa, venante de l'okcidento, direktigis kontraŭ ni grandajn ondegojn, kiuj disrompiĝis sur la flanko de l'ŝipo. La maro havis la odoron, kiun ĝi posedas dum la fulmotondraj tagoj; tio estas miksaĵo de fosforo kaj salo, duonflame, duonglacie.

Malproksime, en la direkto de Chemulpo, oni vidis la lumetojn de l'rusaj krosŝipoj, kiuj estis ankritaj tie, atendante la okazontaĵojn.

Kapitano Sajuk, sur la ponteto, alkriegis laŭvice, jen dekstren, jen maldekstren, la necesajn ordonojn por alteriĝi. Ĉio estis kvieta, la viro komisiita al la direktilo ŝajnis kva-zaŭ algluigita al sia rado, la du brakoj streĉitaj; la deĵoraj maristoj fumis. Sed ekzistis malkvietaj profiloj apud la kroĉiloj de l'granda boato kaj mi ekkonsciis, ke oni klopodas enmarigi barkon. Lagrange alproksimiĝis:

— Nu, infanoj miaj, rapidu!

Dum ili laboris, mi prenis aparte Lagrange:

— Serioze, diru al mi, kio okazas?

— Nu, respondis li kun voĉo tiel mallaŭte, kiel permesis al li la bruego de la manovristoj, tio devenas de tiu malbena milito.

Ni estis dum la nokto de la 8-a al la 9-a de Februaro 1904-a, kaj mi estis sub la impreso, tiam ĝenerala, ke la milito neniam okazos aŭ almenaŭ estos prokrastita senfine.

— La milito, diris mi, neniu kredas ĝin.

— Mi havis la saman impreson, kiel vi, respondis Lagrange, sed kapitano Sajuk aŭdis interbabiladon de du japanoj altrangaj, kiu lasas neniun dubon pri la intencoj de l'Leviĝanta Suna Imperio.

— Vi tamen tre bone scias, ke ĉiu el ni aŭdis jam tielajn raportojn.

— Jes, sed ili ne venis de konata diplomato aŭ de sekreta agente de l'Mikado en Port-Arthur. Kapitano Sajuk

estas unu el la maloftaj eŭropanoj, por kiu la japana lingvo ne havas sekretojn. Ĉar tiu cirkonstanco ne estis konata de l'interparolantoj, ili ne ĝenis sin, kaj Sajuk tiel eksciis ĉion, kion li volis, pri la decido de l'insulanoj, koncerne atakon tiel rapidan, kiel energian.

— Kaj tiam ?

— Tio ne saltas al ci antaŭ la okulojn...

— Mi konfesas mian simplanimecon.

— Nu, Sajuk, posedante sekreton de tiel granda graveco, dezirus averti nian reprezentanton en Seoul, por ke li prenu la necesajn singardojn. Sed li prave timas la japanan ŝiparon.

— La milito ne estas anoncita.

— Bela certigo ! Ĉu ci kredas, ke la Nipanoj estos embarasataj pro afero tiel malgrava ? Tion, kion ni bezonas fakte, estas lerta nokta elŝipiĝo kiel eble plej kaŝema kaj silenta, kaj decidita viro por konduki tion, por pretendi, se bezone estas, ke li obeas nur je privataj interesoj. Oni konas cian valoron... Se okaze la Japanoj aŭ la Rusoj ekkaptus cin, ni liverus al ci talismanon por la lastaj nomitaj, kaj tuŝante la unuajn, ni elŝirus cin el iliaj ungegoj. Ĉiokaze, atentu, ke Sajuk ne estu kompromitita.

— Sed, mi diris, kaj la maristoj ?

— Kvar remistoj... Ci zorgos pri la direktilo kun la sciigoj, kiujn mi ekdonos al ci, kaj kunprenos bonan kompason... Se oni kaptos cin, ci kriegos kiel diablo, postulante la francan konsulon kaj ministron, se ci sukcesos trapasi, ci sensanceliĝe plenumos cian mision.

Mi ne rezonis plu, mi estis tute je la ĝojo ludi gravegan rolon, kiun mi povus pli malfrue rakonti el miaj amikoj. La boato estis preta, mi enbarkigis kun kvar elektitaj maristoj, maljunulo konante preskaŭ perfekte la alteriĝon kaj tri bravaj junuloj.

Estis tre malfrue, kiam ni forlasis la siron kaj unue ni fortege penadis, ĉar ni devis kontraŭremi fluojn, kiuj troviĝis tie je la momento de l'alfluo. La ondegoj ankaŭ malhelpis nian marveturadon, ĉar ili alnaĝis de l'sudo kaj sud-oriento kaj mi estis devigata kontraŭprezenti al ili la malantaŭan parton de l'ŝipo, malgraŭ tio, ke ni direktis nin al oriento. Pezaj ondegoj eniris en la boaton, sed la plimalbono el ĉio estis, ke mi perdis mian mardirekton kaj la suno estis jam de longe leviginta sur la horizonto antaŭ ol mi povis rekoni mian eraron.

La maljuna maristo ruligis sian tabakmaĉajon de unu vango al la alia kun tiom da fervoro, ke oni povus kredi, ke li posedas ŝvelon sur ĉiu flanko de l' vizaĝo. Mi rimarkis je tiu signo lian maltrankvilecon kaj mi demandis lin :

— Ni estas forportitaj multe tro norden, ĉu ne ?

— Al la rusaj ŝipoj, murmuris la maljunulo.

— Tio ne ĝenas min, mi diris, mi multe pli timas la Japanojn.

— Se tiel estas, kion vi deziras, alridis unu el la junaj remistoj, vi havos duoblan plezuron, ĉar jen alproksimiĝas la malgrandaj Nipanoj.

— Ĉi vidas tion, ĉi ? diris la maljunulo.

En tiu sama momento lumeto ekbruligis sur la horizonto, poste, surda eksplodbruo ekmovis la ondegojn.

— Kaj mi eĉ aŭdas ĝin, ekkriis la plej juna.

— Kion ili havas por tiel pafi ? demandis la maljunulo.

Dua pafado, poste tria, haltigis la interparoladon.

Ni vidis la rusajn ŝipojn turniĝe manovri laŭ speciala ordono kaj subite iliaj paflegoj sputis ankaŭ.

— Kiel vi klarigas tion ĉi ? demandis la maljuna maristo.

Mi estis tre ekscitita, antaŭvidante malfeliĉon.

Kaj subite la sceno ŝanĝiĝis por ni. La timeginda japana ŝiparo videbliĝis, celante la rusajn ŝipojn.

— Estas milito ! mi ekkriis, milito sen *ultimatum*, eble sen minackondiĉo.

— Estas necese, ke ni suprentiru la francan flagon, diris la maljunulo.

Li eltiris el la maro sian remilon, faris per ĝi maston je kies ekstremaĵo li alligis la francajn kolorojn.

Mi tute ne plu pensis al mia misio. Mi rigardis la rusajn krosŝipojn ; mia animo plenkompatis la kuragulojn, kiuj sendube devis brave pereii.

Tamen, la atako ne tuj venis. Horoj pasis. Ni ekkredis je simpla okazintaĵo, kiam eksplodbruo rekomenciĝis.

Estis tiam absolute certe, ke ĉiuj rusaj ŝipoj baldaŭ endroniĝos.

— Kamaradoj, mi laŭtvoĉe diris, estas tute necese, ke ni estu la unuaj por savi niajn amikojn !

— Nu, ni iru tien ! ĉiuj respondis.

La Japanoj, vidante nin trapasi ilian pafdirekton, devis unue pensi endronigi aŭ timigi nin, ĉar kuglego eniris la akvon je dudek metroj de nia boato.

— Ni estas perditaj, diris la maljunulo, ni devas iri returnen.

Mi ne respondis, tenante firme la direktilon al la Rusoj. Nova kuglego minacis nin je dekkvin metroj.

— Ni iru returnen, ekkriis du el la junuloj, ĉesante remi.

Sed la du aliaj, pli obstinaj kreitaĵoj, daŭrigis la remadon; mia direktilo ne malrektigis eĉ je unu colo.

Tiam, ni ĉeestis tiun faman kaj neegalan batalon en Chemulpo, dum la japanaj kaj rusaj kuglegoj pasis fajfante super niaj kapoj.

Kiam la komandanto de l' « *Variag* », imponita per la cirkonstancoj kapitulaci, decidis eksplodigi sian krozŝipon, ni subite vidis la maron kovrita per nigraj punktoj, kiuj surnaĝis. Estis maristaj kapoj.

La ŝipo Paskal kaj aliaj ŝipoj de diversaj naciecoj enmarigis siajn barkojn, sed neniu el ili alvenis tiel rapide, kiel ni, por kolekti la malfeliĉulojn.

En unu momento, nia boato estis plenplenigita, preta por internigi en la maron, kaj tutĉirkaŭe, manoj sin apogis sur la boatrando.

Ni ne pensis eĉ unu minuton pri la danĝero.

Inter la rusaj maristoj troviĝis unu, kiu parolis perfekte france, kaj ni atendis la eksplodon de la torpedo, kiu devas nenigi « *Variag* »-on.

Kelkaj timigaj minutoj pasis, poste terurega eksplodo aŭdiĝis sur la malkvietaj ondoj, kaj « *Variag* » majeste malaperis en la maron.

Unuvoĉa ekkrio salutis tiun heroaĵon.

En tiu momento mem, mano tuis mian ŝultron, kaj returnante min, mi vidis grandan diablulon, kun mieno de kozako, kiu ploris, montrante sur la maro kapon de naĝanto, je proksima interspaco.

— Oficiro, diris li. . . .

Kaj frapante sin sur la antaŭbrako :

— Li, vundita. . . .

La Japanoj, iliaflanke, estis enmarigintaj siajn boatojn kaj unu el tiuj ĉi estis alproksimiĝinta al la oficiro. La malfeliĉulo naĝis al ni nur per helpo de unu brako. Videble, li ne povis atingi nin antaŭ ol la japana boato alvenus kontraŭ li. Aliparte, ni estis tro ŝarĝitaj por kontraŭbatali ĝian rapidecon.

Mi prenis tujan decidon. Mi komisiis la direktilon al la



kozaka vizaĝulo, fortiris miajn vestojn kaj du minutojn pli malfrue, post belega subakviĝo, mi eliris el la maro je ses metroj de nia barko. Estas en tiaj momentoj kiam oni gratulas sin esti lerninta multajn sportojn. . . .

Ĉu mi ne gajnis jam la kuradon de unu mejlo sur la Tamizo en Londono ? . . .

Sed, ho ve ! kvankam mi naĝis kiel eble plej rapide, la boato antaŭeniras sur la maro ankoraŭ pli rapide !

La Japanoj kaj mi, malespere batalis.

La akvo estis malvarmega, mi ne sentis ĝin.

Mi antaŭennaĝis kiel salmo.

Fine, mi metis la manon sur la viro, kun triumfa ekkrio :

— Kuraĝu, oficiro mia !

— Franco ! li diris.

— Jes, mi respondis ; apogu vin sur mia ŝultro.

En la sama momento, ni troviĝis en la Japanaj akvoj.

— Kapituluacu ! kriis angle la ĉefo de la barko.

— Mi estas Franco, mi diris.

— Donu al mi tiun ĉi viron, li apartenas al ni.

— Ne, li apartenas al mi, ĉar mi savis lin.

Mi naĝis ĉiam al nia barko, kiu troviĝis nur je tri metroj.

Japano faris geston por ekkapti nin.

Je tiu sama momento, mia bravega maljuna maristo, kiu sekvis tiun scenon kun treega maltrankvileco, manprenis nian francan standardon, fiksitan je la ekstremaĵo de l' remilo. Kaj etendante ĝin sur nin, ekkriegis :

— Tiuj viroj apartenas al Francando !

La Japano, tute konfuzita, haltigis sian geston kaj ordonis returni malantaŭen, dum dek frataj manoj ekkaptis tiun de la rusa oficiro.

Koncerne min, ĉar ne ekzistis plu unu loko en la boato, mi naĝis malantaŭen ĝis la momento, kiam la krozŝipo Paskal povis kolekti nin ĉiujn.

*Tradukis* HENRI DE COPPET.

29. de Marto 1904.

---

**Aviz.** — La Rédaction de *La Dek-Sepa* désire acheter les Numéros suivants : N° 2 (Janvier 1911) ; N° 7 (Juin 1911) ; N° 12 (Janvier 1912) ; N° 13 (Février 1912) ; N° 14 (Mars 1912) ; N° 24 (Mars 1913).



## Legomejisto kaj filozofo

Fablo de **Krilov.**

Printempe, legomejisto en sia legomejo, kun fosilo en la manoj, fervore laboris, preparante la teron por semi kukumojn. Al li venis lia najbaro — filozofo, tre instruita homo, kiu tre amis la naturon entute, kaj aparte la legomejan aferon. Li multe legis kaj parolis pri tiu ĉi afero kaj eĉ decidis mem, per propraj manoj prilabori sian legomejon.

— Nu, najbaro, moke diris la filozofo al la legomejisto, kiom ajn vi penu kaj ŝvitu, via legomejo estas vera dezerto kompare kun la mia. Mi eĉ tre miras, ke vi ĉe via legomejo ankoraŭ ne malriĉiĝis. Vi kompreneble, lernis nenian sciencan?

— Jes, respondis respektive la legomejisto, mi ne havis tempon por tio ĉi. Cetere, ankaŭ sen scienco Dio donas al mi panon por mia diligenteco kaj senĉesa laborado.

— Malklerulo! ekkriis kolere la filozofo, vi kuraĝas malŝati la sciencan!

— Ne, sinjoro, humile respondis la legomejisto, mi tute ne faras tion ĉi. Mi ĉiam estas preta transpreni de la sciencan ĉion bonan kaj utilan. Sed estas tempo por prepari la teron por la semado; tamen vi ankoraŭ eĉ ne komencis tion ĉi.


— Mi ne havis tempon, rediris la filozofo. Mi ĉiam legas specialajn librojn kaj ankoraŭ ne decidis fine, per kio pli bone estas fosi la teron: per plugilo aŭ per fosilo.

La najbaroj disiĝis. La legomejisto daŭrigis sian laboron kiel antaŭe, kaj la filozofo ankaŭ ne estis senokupita. Li senĉese legis librojn kaj laboris en la legomejo. Apenaŭ io komencis kreski, tiam la filozofo trovas novaĵon en la libroj kaj elfosas ĉion semitan, ree transplantas ĝin laŭ nova maniero, kaj tiel plu.

Kia do estis la rezultato? La legomejisto havis sufiĉe bonan rikolton, kaj la filozofo restis sen kukumoj.

*El la rusa lingvo tradukis*

M. S. RAKITSKIJ.



## BLINDULOJ KAJ KOLOROJ

Tiun ĉi rakonteton mi legis en la verkoj de Voltaire.

Tricent blinduloj kune loĝis en malsanejo; ĉiuj estis egalaj, decidis pri siaj aferetoj laŭnombre de l'voĉoj, palpe diskonis perfekte monon arĝentan kaj monon kupran; neniu prenis Brie'an vinon anstataŭ Burgundan; ili pli delikate flaris ol najbaruloj, kiuj havis du okulojn; ili pri kvar sentoj tre prave parolis kaj konis ĉion permese lerneblan, ili vivadis pace, feliĉe, kiel povas blinduloj.

Bedaŭrinde, unu el iliaj profesoroj pretendis esplori klare la vidon, sin aŭdigis, intrigis, naskis entuziasmon. Elektite mastro de la komunumo, li komencis majstre juĝi pri koloroj; ĉio pereis.

Tiu ĉi unua diktatoro de Tricent Blinduloj formis por si konsilantaron, akiris posede ĉiujn almozojn; neniu kuraĝis kontraŭ li stari.

Li decidis: « ĉiuj vestoj de blinduloj estas blankaj ». La blinduloj lin kredis; ili nur parolis pri siaj belaj blankaj vestoj, kvankam eĉ unu ne havas tian koloron.

De l'tuta mondo mokite, ili plendis al sinjoro diktatoro, kiu ilin malbone akceptis, riproĉis paradoksi, ribeli, sekvi opiniojn erarajn de okululoj, maltime dubi pri senerareblo de sia estro.

Tiu ĉi disputo dupartiumis ilin.

Por ilin repacigi, la diktatoro legigis: « ĉiuj vestoj estas ruĝaj ». Eĉ unu ruĝa vesto ne estis inter ili. Oni mokis ilin pli ol iam; novaj plendoj en la komunumo; kolerigis la diktatoro, same ceteraj blinduloj.

Post longa batalo nur permeso ne juĝi kolorojn de vestoj rekunigis la korojn.

\*  
\* \*

Leginte tiun rakonteton surdulo konfesis: « Blinduloj senrajte juĝis kolorojn »; sed li daŭrigis opinii fortike: « Nur surduloj rajte juĝas muzikon ».

## Anekdotoj

Dum la vojaĝo en Londono de l'« saĥ » (reĝo) de Perslando Nasr-ed-Din, la tiama princo de Wales, poste Eduardo VII-a, invitis al ceremonia manĝado la orientan monarkon.

Dum la manĝado oni alportis asparagojn.

Tiu ĉi legomo mirigis la « saĥ »-on, kiu kredeble estis neniam vidinta ĝin, aŭ almenaŭ manĝinta laŭ la angla maniero: li prenis asparagon, glutis la duonon, kaj... forjetis la restaĵon post sin.

La gesto estis embarasanta.

Tamen la princo de Wales ne volis, ke lia gesto saĝnis agi kontraŭ la etiketo: li jetis mem sur la pargeton siajn asparagajn restaĵojn — kaj, kia estis la miro de l'servistoj!... ĉiuj aliaj kunmanĝantoj same agis.

\*  
\*   \*  
\*

La itala komponiciisto Mascagni, iam starante ĉe hotela fenestro en Londono, rimarkis gurdiston apude, kiu ludas la konatan « Intermezzo » el *Cavalleria Rusticana*. Subite, incitite de la tro malrapida ludado de l'gurdisto, li eliras sur la straton kaj alparolas la ludanton:

— Lasu al mi la turnilon, ke mi ludu.

— Sed, kiu vi estas, sinjoro?


— Mi estas l'aŭtoro de l'muzikajo. Vi nebone ludas, kaj mi volas montri al vi la ritmon.

Kaj li komencis ludi laŭ la takto.

La sekvintan tagon, li vidis denove ĉe la sama loko la saman gurdiston. Sed tiu ĉi, antaŭ ol ekludi, elpendigis grandan skribajon kun la vortoj:

« Instruĵo de Mascagni »

Oni divenas la mienon de l'muzikisto.





Vera  
 Ferhava Salo  
 alsimiligobla  
 ELTROVITA DE  
 M. Maurice ROBIN  
 en 1881.

LA  
**Fer Robin**

mirinde efikas  
 KONTRAŬ  
 SENSANGECO,  
 PALKOLOREGO,  
 SANGELFLUOJ  
 ĈIUSPECAJ  
 Akcelas la nutraron kaj  
 neniam mallaksigas.

Tiu ĉi kuracilo, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ĉiu mango, ĉu en londa akvo aŭ vino. La enhavo de la botelo reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn  
 POSTULU la ROBIN  
 VENDEDJO POGRANDE:  
 13, Rue de Poissy, PARIS